



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 137 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. DECEMBRO, 1931

ALL THE WORLD SPEAKS ENGLISH??

Here is yet another example, if such were needed, of with what little wisdom the world is governed. It is from the "Age" of 20th November.

"The meetings of the League Council are being further complicated by the insistence of Dr. Sze and Mr. Yoshizawa on speaking in their own languages, necessitating lengthy interpretations in English and French."

These two gentlemen, highly educated representatives of their countries, men who, doubtless, have spent years in language study, prefer to conduct their case in their respective tongues. Yet we are asked by some to believe that English is destined to become the universal tongue of common men.

While events of the utmost gravity move in Manchuria with lightning rapidity, and humanity is by them exposed to the danger of another world cataclysm, senility, enthroned at Geneva, dodders along with its antiquated and unsatisfactory system of translating ad infinitum. Not only is there the shocking waste of time in actual translation but there is also the certainty of ceaseless bickering over the doubtful renderings in the translated texts.

Esperanto should be the language of introduction to the national tongues. As it is, by far the greater part of those who study foreign languages in school learn just enough to launch themselves on to a sea of unending embarrassments.

The above delegates, by their rejection of English and French, give no encouragement to those who think that the problem of language diversity will solve itself and that the curse of Babel will be lifted from a passive, do-nothing humanity.

PRI LA DEVENO DE LA KOKOSO.

El la papua lingvo
tradukita de Pastro A. H. Lambton.

En la antikvaj tempoj la kokoso ne ekzistis en Papuo. En tiuj maldolĉaj tagoj akvo sola estis trinkata de la homoj por sensoifigi, kaj "taro," t.e., botanike "Colocasia Antiquorum" (eble "kolokasio" esperante) ne estis mikсата kun kokosa oleo; tial la korpoj de papuanoj ne estis ŝmirataj per oleo kiel hodiaŭ.

La antikvuloj, ne sciante la bonaĵon en la kokoso, estis kontentaj sen ĝi. En tiuj tagoj estis unu vilaĝo, kies loĝantoj fiŝkaptis senĉese. Ili iris por fiŝkapti matene, kaj revenis vespere kun la kaptitaj fiŝoj, vicigitaj sur branĉetoj. Unu el la loĝantoj, nomata Matamelo, ĉiufoje iris sola por fiŝkapti, kaj vespere li revenis kun korbo plena de fiŝoj, ĉar lia kaptaĵo estis tro multa por vicigi sur branĉeto. La loĝantoj de la vilaĝo miregis pri la grandaj kaptoj de Matamelo. Li ankaŭ ĉiufoje malpermesis ĉiun sekvi lin, kiam li iris fiŝkapti. De tempo al tempo la vilaĝanoj diskutadis inter si la kutimojn de Matamelo, kaj konsiliĝis amase, por eltrovi, kion li faras, sukcesante havigi al si kaptojn pli grandajn ol tiuj de aliuloj. Okazis, ke unu knabo aŭdis ilian diskutadon kaj elmontris projekton:

"Morgaŭ, kiam li eliros," diris la knabo, "mi observos sekrete, el la longa herbaĵo, kion li faros."

"Vere, vi diris bone," respondis la viroj, kaj ĉiuj estis kontentaj, ke li faru tion, kion li diris. En la morgaŭa tago la knabo faris tiel, kiel li aranĝis. Frumatene en la sama tago Matamelo leviĝis kaj eliris vojeton, laŭkutime, kaj la knabo sekvis lin aliflanke tra la

longa herbaĵo. Iafoje en lia deziro por vidi tion, kio okazis, la knabo rampis tre proksime, kaj la folibruadon Matamelo aŭdis, kaj kaŝrigardis herbaĵon, pensante, ke la bruadon kaŭzis porko aŭ alio, kiun li mortpikos per ĵetponardo. Sed la knabo kaŝis ŝin ruzege kaj sekvis Matamelon tre silente, ĝis ili alvenis marbordon. Tiam la knabo sin kaŝis post korka arbo kaj de tie vidis tre kuriozan sed teruran aferon. Matamelo demetis sian korbon kaj poste ambaŭmane detiris for de si mem la propran kapon! Li ĝin demetis sur sablon flanke de la korbo. Poste li piediris en maron al la nivelo de sia talio. Tie li staris, dum la knabo ek-tremis pro timo antaŭ la terura vidaĵo. Longan tempon li staris; tiam subite sin klinis en la akvon, kaj multaj fiŝoj malsupren-ĵetis sin en lian gorgon. Post mallonga tempo la senkapa viro levigis kaj vadis al la marbordo. Tie li deskuis la fiŝojn kaj poste palpe serĉadis sian kapon. Trovinte ĝin, li ĝin metis sur sian kolon. Tiam li sidigis kaj klasigis la fiŝojn, kiujn li estis kaptinta, plenigante sian korbon per la plej grandaj kaj forĵetante la malgrandajn. Ĉion ĉi la knabo vidis de kie li kuŝis kaŝe, kaj poste li forkuris hejmen.

Denove vespere ĉiuj krom la knabo manĝis la fiŝojn, kiujn Matamelo kaptis. Multaj demandis lin, kial li ne manĝas. "Ĉu vi fastas?" "Ne, ne," li respondis, "mi tute rifuzas ĉe tuŝi per la mano la fiŝon, kiun Matamelo kaptis." Matamelo, aŭdinte liajn vortojn, ekkoleris kaj malbenis la knabon, dirante, "Iru kaj formanĝu la hepaton de via patro kaj mortu." Tiu malbeno estas la plej malbona, kiun la papuanoj povas eldiri. Poste vidigis, ke la malbeno resaltis sur la kapon de la malbeninto. Post la manĝo la ceteraj viroj iris kun la knabo aparte kaj demandis lin, "Pro kio vi ne manĝis fiŝon?" Tiam la knabo rakontis al ili la veron pri la aferoj, kiujn li vidis en la hodiaŭa tago. Nu, la viroj, aŭdinte la rakonton, siavice naŭzon sentis. Ili tiam diris:—

"Do, morgaŭ ni iru kaj punu Matamelon, kiu faris ĉi tiun malbonagon, nutranĝe nin per ensorĉitaj fiŝoj." Kompreneble, ĉiuj konsentis. Morgaŭan tagon ili faris tion, kion aranĝis ili. Baldaŭ veninte al la kaŝejo, la observantoj vidis Matamelon forpreni de si la kapon kaj demeti ĝin sur la sablon. Tiam, laŭ sia antaŭa kutimo, li sin klinis en maron, por ke la fiŝoj malsupren-ĵetu sin en lian gorgon. Tuj

unu el la observantoj sin levis, elkuris, kaj ekkaptis la kapon kaj forĵetis ĝin de si malproksimen en arbetojn. Nature, ĉiuj atendis, por vidi tion, kio okazos. Post ne longe Matamelo turnigis kaj rapide revenis marbordon. Tie deskuante la fiŝojn, li palpe serĉadis la kapon ambaŭmane. Sed, ho ve, li ne povis ĝin trovi. La observantoj lin vidis rampanta sur ŝtonetojn, kun ambaŭ manoj etenditaj palpe serĉadante, sed senrezulte. Subite la senkapulo levigis kaj kuregis denove en la maron. Jen! antaŭ iliaj okuloj li fariĝis granda fiŝo kaj subakvigis for de ilia vido. Tiam ili reiris hejmen. Post kelka tempo la knabo, kiu unue kaŝrigardis Matamelon, rememoris la kapon, kiu estis forĵetita en la arbetojn. Li iris, por serĉi ĝin, por ke li sciu tion, kio okazis pri ĝi. Sed kiam li alvenis al la loko, kien ĝi estis forĵetita, li ne povis ĝin trovi, sed anstataŭe li vidis maldikan palmon kun etenditaj folioj. Neniu sciis de kia speco ĝi estas. Sed poste, kiam ĝi fruktis, la vilaĝanoj ne manĝis ĝin pro timo. Fine unu el la virinoj manĝis kaj trinkis la sukon, kaj ankaŭ ŝmiris sin per la oleo. Ĉiuj observadis ŝin, ĉu si malsaniĝis aŭ ne; sed kontraŭe ŝi plisaniĝis. Tiel ĉiu homo ekkonis pri la kokoso, ke ĝi estas bona. De tiam, ĉe ĝis nun, ĝi estas manĝaĵo kaj trinkaĵo. Sciu, ĉi tiu rakonto estas vera. Vidu nun sur la kokosan kernon, kiam ĝi estas ankoraŭ en la ŝelo, kaj vi vidos la vizaĝon de la viro Matamelo, kies kapo fariĝis la unua kokoso.

FRENCH ESPERANTIST IN MELBOURNE.

In October Mr. Rawson received a visit from s-ro Daniels, a French Esperantist on his way to France after a holiday in New Caledonia. Owing to the shortness of his stay here he was unable to visit the club, but Mr. Drummond showed him the sights of our city. He spent a month in Sydney, being a frequent attender at the society there.

This is but another proof of the international worth of Esperanto, for, although Messrs. Rawson and Drummond speak no French, and M. Daniels is mute in the English language, they experienced no difficulty whatever in their conversation.

FOR BEGINNERS

HONESTA BUTERVENDISTO.

En iu franca vilaĝo panvendisto aĉetadis la buteron, kiun li bezonis, ĉe terkulturisto de la ĉirkaŭaĵo. Lutage, ŝajnis al li, ke la buterbuloj ne havas la pezon kontraktitan. Li do pesis ilin kaj konstatis, ĉiukilogramo, pli aŭ malpli grandan mankon.

Pro tio li indigniĝis kaj denunciis la terkulturiston, kiu estis venigita antaŭ la juĝiston.

"Ĉu vi havas pe silon?" demandis la juĝisto al la akuzito.

"Jes, sinjoro juĝisto."

"Kaj peziloj?"

"Ne."

"Kiamaniere do vi povas pesi vian buteron?"

"Estas tre simple. De kiam la panvendisto aĉetas ĉe mi la buteron mi aĉetas la panon ĉe li, kaj mi uzas liajn panbulojn de unu kilogramo por pesi mian buteron. Se la pezo estas ne ĝusta, la kulpo ne estas mia, sed lia.

AN HONEST BUTTER-VENDOR.

In a certain French village a baker used to buy his butter from a peasant of the neighborhood. One day it seemed to him that the blocks of butter were not of the right weight. So he weighed them and found that in every kilogram (2.2 lb.) there was, more or less, a shortage.

At this he was indignant, and denounced the peasant, who was summoned before the judge.

"Have you any scales?" the judge asked accused.

"Yes, your worship."

"And weights?"

"No."

"Then how do you weigh your butter?"

"That's easy. Since the baker buys my butter I buy his bread, and I use his one-kilogram loaves with which to weigh my butter. If the weight is short, the fault is not mine but his."

TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following:—

Mr. F. McLeod, 4/6, Apr., '33; Mrs. Bigelow, 5/-, Oct., '32; Melb. E. Soc. (adv.), 5/6, Sept., '32; Mr. L. Wirth, 4/6, Nov., '32; Mr. A. Greiser, 10/-, Sept., '33; Mr. T. Enderby (sales), 6/-; Mr. Franks, 6d.; Mr. Alexander, 1/-; Sales, Club, 2/4; Mr. D. Munro, 7/6 (abono k donaco), Sept., '32; Advert., 2/-; Mr. R. Fitzgerald, 4/6, Sept., '32; Mr. A. Kelley, 10/-, Oct., '33; Miss Carrick (sales), 2/-; Miss Cox (adv. and sale), 2/4; Mr. F. Bury, 5/-, Jan., '33.—Total, £3/12/8.

KRONIKO.

Perth, W.A.—Estimata samideanino nia antaŭ ne longe forlasis Perth-on kaj migris al Harvey, en la sudokcidenta regiono de tiuĉi ŝtato. Jam f-ino M. Miller klopodas disvastigi konon de Esperanto inter homoj en tiu ŝtatparto. Ŝi starigis grupon, kaj nuntempe ok anoj partoprenas lernadon de nia lingvo. Ĉiu el ni deziras al la instruistino kaj lernantoj sukcesplenan kurson. En Perth-o ni tre sentas la foreston de kelkaj anoj, kiuj devis forlasi nian societon pro diversaj kialoj; espereble, post iom da tempo tiuj re-aligis.

Melburno, Vic.—Sub la titolo "Memoraĵoj de Vojaĝisto" s-ro P. Hudson, ĉe la Melburna Societo, donis interesan paroladon pri la bestaro de Hindujo. Krom la rakontado de propraj spertoj, li parolis pri la loko, kiun la bestoj okupas rilate al la religioj de la lando. Iuj bestoj estas sanktaj, kaj estas krimo mortigi ilin, kaj oni ankau kredas, ke la animoj de homoj iras post la morto en la korpojn de bestoj.

La Societo plezure anoncas, ke s-ino M. Dunne kaj s-ro P. Holmes gajnis la Diplomon de B.E.A. S-ro Holmes gajnis kun distingo.

Gesinjoroj Beswick, el Perth, ferias en Melburno, kaj vizitis la Societon.

ORIENTA GAZET-SERVO.

We have received from the "Komitato por Internaciaj Rilatoj," 5 Mao-tan Street, Nanking, China, a statement in Esperanto setting forth China's case against Japan. The above Service, by issuing regular bulletins, aims at securing world-wide publicity by translated reproductions in the different countries' press. The indictment is restrained in tone, and closes with a call to the world to witness China's patience. Copies will be sent free on request.

TO ALL CONCERNED.

The administration would be greatly encouraged were it to receive some notification from the many lapsed subscribers who, for a long time now, have been the recipients of La Suda Krucio. The sending out of notice after notice informing such of their indebtedness to the paper represents no small charge on our resources. It is with the greatest reluctance that we cease despatch of the gazette to readers, as we desire above all that it have the widest possible circulation among those whose interests it is pledged to serve. We do, however, want to know if it is being appreciated. The most eloquent affirmative would be provided by wiping off some, if not all, of the debt owing it.

Will such readers as have, for this reason or that, suffered their subscriptions to fall into arrears, do their level best to provide at once salve to their conscience and life blood to our organ, which, despite a hurricane of adverse circumstances, is still voicing to the world that Australasia counts as a factor in the acceleration of the Esperanto movement.

Every Esperantist worth his salt will strain every nerve with us to make 1932, year of golden opportunity, the year of salvation for S.K. This, the last issue for 1931, goes to press under a small deficit. This must be met and a January number assured, for conditional on regular appearance during 1932, auxiliary revenue has been promised from an advertisement which, together with an awakened response from certain readers, would lift the paper into safety.

Into the rampart we are rearing build your brick NOW, mortared if necessary with the cement of sacrifice. So you shall share in the pride of participation in that victory whose coming is as sure as the sun.

—TO LET—

In the popular mountain resort, Belgrave, Vic., comfortably furnished 4-r. cottage, with bathroom, E.L., 2 verandahs, accom. six., close tennis courts, shops, rail, station. Moderate rental. Apply Miss V. Cox, 31 Albany Cres., Surrey Hills, Melb.

KOMPATINDA KLEM.

Originalo de John Merchant.

Havebla ĉe B.E.A. Prezo 1/6, 2/6 bindita.

Rakonto 90-paĝa pri nedezirita flin-fano, kiu, fariĝinte riĉa E-tisto, vizitas la Kongreson ĉe Helsinko. La tieaj travivaĵoj estas supozinde tiritaj el la taglibro de la aŭtoro, prezidanto de I.C.K. La verketo, malgraŭ ĝia nemulta literatura valoro, taŭgas por neanglalingvanaj E. rondoj, se la paĝoj pri negoc-afarado ne ilin tro ĝenos.

Lingvaĵo tre korekta, flustila. 13, volvigataj (volvitaj); Ĉu komprenebla estas, "Tiri haringon trans la vojeton"? 32, "Finlande" (finlingve); metu "miro pri" antaŭ "malŝpareco" sur p. 58/4. "Snob" mankas al multaj vortaroj. "Havigi" postulas nerekta kompletmenton.—Robo.

Pri la prepozicioj DE, PER, kaj JE post pasiva participo.

Post pasiva participo:

(a) Ĉiam uzu "de" (by) por montri la aganton. Laŭ la konsilo de doktoro Zamenhof (Lingvaj Respondoj, Plena Kolekto pĝ 73) neniam uzu ĝin alisignife. Kvankam kelkfoje en sia verkaro Zamenhof uzis ĝin en la senco de "from" por montri devenon aŭ komencan punkton, li evidente tion faris ne konscie (Fundamento de Esp. pĝ vi). Oni tial evitu eraran uzon de "de," uzante alian prepozicion aŭ lerte ŝanĝante la konstruon de la frazo.

Ekzemploj: La libro estas legata de (by) Adolfo. (L.R. pĝ. 73). Lia palto estis ŝtelita for de (from) la hoko, sur kiu li pendigis ĝin. (L.R. pĝ 73). Ŝi troviĝis ŝirmata kontraŭ (from) liaj entreprenoj. (L.R. pĝ 73). Jen estas la letero ricevita el (from) Londono. La tero estas kovrita de (by) neĝo. (Rimarko: Ĉar la neĝo mem kovris la teron, ĝi estas la aginto. (L.R. pĝ 73).

(b) Por montri la ilon aŭ rimedon ĉiam uzu "per" (by aŭ with).

Ekzemploj: Li estis mortigita per sago. La letero estas skribita per blua inko. (L.R. pĝ 73).

(c) Por montri la uzatan materion uzu "je" (with), aŭ oni povas uzi "per," se "per" montranta ilon ne okazas en la frazo.

Ekzemploj: La kavo estis plenigita

je sablo de Johano per ŝovelilo. La kavo estis plenigita per (aŭ je) sablo de Johano. (Gego)

Domo de Homamo. — Projekto kaj Opinioj pri grandioza entrepreno. 14p., unu respondkuponon. "Oomoto," 1 rue Felix-Faure, Paris 15.

Fundamento de Animo. — "Klarigo pri la spirita mondo kaj la postmorta vivo," de Onisabro Degučĉi. Pensigas okcidentanojn pri simila instruado de Emanuel Swedenborg. 2 respondkuponoj ĉe Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka Kioto-Hu, Japanujo.

Aliĝu senprokraste al la 10a jubileo eldono de
BES-ADRESARO

de Esperantistoj de ĉiuj landoj!

Tiu ĉi jarlibro celas kolekti adresojn de ĉiuj E-istoj, de ĉiuj E-entreprenoj kaj de ĉiuj firmoj uzantaj Esperanton, ebligante al ĉiu helpe de praktike aranĝita registro trovi la deziratan adreson. Simpla aliĝo 0.50 svisa franko (aŭ 2 respondkuponoj); aliĝo kun adresaro 1 sv. f.; anonca pago 25 sv. f. Postulu tuj senpagan detalan interesan prospekton kun aliĝilo ĉe la eldonanto: BES (Bohemá Esperanto-Servo) Potštejn, Ĉeĥoslovakio, Eŭropo.

GRATULON

al s-ro P. F. Mulrennan, de Hokitika, Nov-Zelando, kiu honore eltenis la Supran Ekzamenton de la B.E.A.

PARDONON!

Unu el la plej bonaj anekdotoj pri profesora distriteco estas jena:

Unu tagon profesoro eniris kafejon por refreŝigilo. Li donis al la kelnerino dumarkan bileton kontraŭ taso da kafo kun sukerpecoj. Post iom da tempo li petis de ŝi la sangmonon. "Mi ĝin jam donis al vi," respondis la servknabino. "Sed ne!" rebatis koleriĝe la profesoro. La disputo finiĝis sen kontentigo, kaj la erudiciulo foriris en ĉagreno. Post tri tagoj li ankoraŭ fojon vizitis la ejon por sia kutima regulaĵo. "Jen via mono restinta el la bileto, kiun vi donis antaŭ tritago," diris la veninta kelnerino, etendante al li kelkajn moneretojn. "Ja bone, vi estas en tio kulpas, kaj ŝuldas al mi pardonpeton," ridetis facilokore la profesoro. "Tute ne," finbatis la ino malice, "palpu en la poŝo por trovi tie la sukerpecojn; la moneretojn mi eltiris el la tasfundo."

"BUCH DER GUTEN WERKE."

Vi sendu kontribuojn!

Iu germana eldonisto nun kolektas materialon por libro, kiu espereble estos tre multpaga.

La verko havos titolon "Buch der guten Werke" (libro de bonaj agoj). Invito kontribui estas proponata al ĉiu homo batalinta en la mondmilito. Taŭgaj por enmeto en la libron estas rakontoj pri iu ajn amikaĵo farita de kontraŭbatalantaj soldatoj al la kontribuanto mem, aŭ al la homo, kiu ricevis la bonvolaĵon en la ĉeesto de la kontribuanto. Kompreneble, ankaŭ la libro celas enteni rakontojn pri amikaĵoj faritaj de la kontribuanto aŭ ties kamaradoj al militistoj de la kontraŭa armeo.

Estas necese, ke ĉiun eblan detalon oni donu, precipe pri la loko, dato, nomo kaj rango de l'koncernataj soldatoj.

La celo de l'libro de bonagoj estas pruvi, ke la ennaska korboneco de l'homo ne estas komplete sufokita ĉe dum la bestaĉa frenezo de la militjaroj.

Kontribuadojn, kiuj ne ampleksu pli ol du nacilingve maŝinskribitaj kvartofolioj, oni sendu al Dr. Bernhardt Diebold, Berlin N. 65, Edinburger Strasse 19, ii. Germanlando.

(El "Foreign Languages," Londono.)

CORRESPONDENCE.

B. en T. Ni opinias "tonelo" la plej bona vorto por "ton."

Teo. en N. "Tagulo" estas la plumnomo de Sir Henry Hyams, kiu ankoraŭ vivas, en Londono, sed ne multe viglas por E-to. Lia romano "Nova Sento" estas simpla, flulegebla, tre interesa.

KION VI SCIAS?

1. Kiu estis la unua viro, kiu vizitis ambaŭ polusojn?

2. Kie estas la plej mallonga distanco inter Ameriko kaj Azio?

3. Kie estas la sola ĉirkaŭ-murigita urbo en Nord-Ameriko?

4. Kiu estas la plej granda statuo de la mondo?

5. Kie estas la plej granda profundo de la Atlantiko?

Radio! 4QG, 8 p.m. Brisbane time, on 15th December.

"THE NORTH AMERICAN ESPERANTO ALMANAC."

Edited by J. Sussmuth.

Although issued late in the year, this 1931 directory to Esperanto in the United States is bigger and better than that for 1930. Its 170 pages contain "The Birth of Esperanto" (Zamenhof), a pithy history of Esperanto's progress, by Armin Doneis, a list of members of the E.A.N.A. individual and corporate, the elements of Esperanto and vocabulary. 50 cents.

"THE BIRTH OF ESPERANTO."

An English translation by Mr. H. Hetzel of the "Extract from letter to N. Borovko," in which Zamenhof explains how the interlanguage took shape in his brain. Every Esperantist should be familiar with the lines of this famous epistle, written originally in Russian, and translated by V. Gernet, whose masterly rendering faces the English text. Price 5d. from the Esperanto Assoc. of N. Amerika, Fort Lee, New Jersey.

"AMERICAN ESPERANTO KEY."

J. Sussmuth.

Ĉi tiu "ŝlosilo" ne estas supera al la angla "ĉefeĉ" dekgrama. La papero estu malpli dika, la formato estu pli malgranda, por faciligi enŝovon en leterkoverton. Nekonsentinde estas konsilo doni al "e" la sonvaloron de la angla "a" en "case"; "e" estas prefere duonsono inter la "a" en "dale" kaj la "e" en "dell." Ni ne allasu du signojn (e kaj ej) por marki unu sonon. Tial ne ĝusta estas "Tüen" (Twain); devas esti "Tüejn." Ne ĉiu "sendaĵo" estas "shipment." La frazo "meeting of the local Esperanto Chapter" hirtigus la harojn, de neanglalingva Esp-ist. La vortaro estas troŝargita je botanikaj kaj bestaj nomoj, kelkaj el kiuj eĉ ne troviĝas en La Plena Vortaro. Cetere, ĉu ne malkunlaboreme nomi "chimpanzee" kaj "penguin" antropopiteko kaj aptenodito? La aŭtoro devas scii, ke en La Plena Vortaro kaj en Millidge sidas "ĉimpanzo" kaj "pingvino." Ĉe la verbradikoj bone estas uzi la anglan infinitivon: ekzemple, "atenti, to be attentive." Prezo 10 cendoj, ĉe Esperanto Assoc. of N. America, Fort Lee, New Jersey.

(Robo)

"LANDO DE ARGENTA AKVO"

de V. E. Roe

trad. E. Payson; eld. Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.
Prezo 1\$. Paĝoj 46.

Emocia epizodo el la vivo de usonano, kiu, vojaĝante en Arizonon, enamiĝis kun edukita Navaja indiano. Sed iu pli potenca ol amo gehoma neebbligis kunfando de l'koroj.

20, Pantro (pantero); 20, humaneco (en la koncerna linio pli ĝuste estus "homnatureco"); 31, Ultimata Perdo (la formo estas sensenca; supozinde, ke la tradukinto celas "Ultima Thule"); 36, dum preskaŭ tutan tagon. (...tuta tago); nebona uzo de -ad, 36, 41, formado, etendado (formacio, etendaĵo); 46, nenumerebla (nenombrebla); 16, pentrita (pentrinda) valetio; 46, koksofalita (koksofalinta), with dropped or relaxed hips.

(Robo)

"HOMARISMA LABORO."

Originalo de Kenelm Robinson.

Kelkpaĝa teatropeco tuŝanta certan mentalecon, kies manifestadoj ne konvenas esti paradataj de la dilettantismo. Prefere, ke la psikistoj, kun difinita faka celo, priverku tiun kampon.

Cetere, ĉu presindas tiu mizera rubaĵeto? Prezo ne indikita. Eld. de la aŭtoro per "L. Mondo."

"THIRTY YEARS IN THE GOLDEN NORTH."

J. Welzl tell the world.

Esperanto literature can now boast its de Rougemont. He is one Jan Welzl, a Czech who, in 1893, roused by stories of wealth to be gained in the Arctic, left his bridge-building on the trans-Siberian line at Irkutsk to embark on a lone and awesome journey northwards that led to a vagrant sojourning of some 30 years among the strange people that inhabit the white wastes lying between Canada and Nova Zemlya.

He knows the Eskimos as very few men do. Their filth, their complete sex-amorality, their shortlivedness, their hut-to-hut diversity of dialect, their barbaric surgery, in which helpless infants are used, as it were, for patching up mutilated patients, all these and a

ĈU VI NOMAS VIN HONESTA HOMO? SE JES, PAGU DO VIAN ABONON!

hundred other features of these folk are dilated on by the long-remembered wanderer.

He visited his home country in 1926, but again left for his loved North. Having no ability to set down his experiences, and fearing to die far from civilisation without giving some form of permanence to his strange memoirs, he arranged that certain Czech journalists should stenograph the account direct from his lips. This was done, not, however, without tactful interrogative guidance on the part of his literary executors, and the result was published in the form of a book in Czech. Its appearance in the inter-language Esperanto is symbolic of the man, for Welzl is indeed a type of the international man, citizen of the world, and in no point more than in that of language. He had by 1924 in great part forgotten his mother-tongue Czech; German, which he knew from his youth, had likewise almost evaporated; Russian and English he had used in simple chatter with those that spoke them; and some thirteen Mongol-Eskimo dialects jostled in his brain. President Masaryk, a polyglot, using all the tongues he knew, strove to engage him in sustained conversation, but was forced to the conclusion that Welzl was a man with no language of his own and possessed of only a hotchpotch of many. The editors of this, his book, found it necessary to have on hand all the dictionaries they could get of the diverse idioms to which Welzl had recourse while telling his adventures.

His style is plain, naively so; there is no attempt at adornment. The crudeness, and at times brutality, that a hard life has engendered in this good-humored, observant man often presents itself to the reader. His Augean cleansing of the Eskimo's foetid cave,

his penal burning alive of the sellers of poisoned liquor are repulsive even in the telling. Some of the passages will never feature in reports of public lectures on the Eskimo.

From his youth he was a wanderer. It was in the family blood, for his brother was swallowed up in the heart of Australia. As a young man Jan left finally his home in Zabreh, Northern Moravia, to walk to Genoa, whence he left for America. He forsook that country to visit Africa, and then crossed the Indian Ocean to Vladivostok and Irkutsk. Then, after a spell of labor there, he pushed on across Siberia by foot to the Arctic Sea, whose shores were to know him for thirty long years. Trading and hunting as one with the Eskimos, he so gained their esteem as to be elected their judicial chief, an "Arctic Bismarck." Voyaging off the Pacific coast of America, he suffered shipwreck and, being without passport, was escorted to Hamburg. Although a wealthy man, Welzl could do nothing as his estate was thousands of miles away, held by the frozen North. So he shipped to Canada, engaged in trapping there and finally bought his passage home to Czecho-Slovakia.

Some of the book's content will cause the discriminating reader to raise his eyebrows in doubt, if not unbelief. Certain it is, however, that having finished the volume he will agree with the reviewer that he has enjoyed the most extraordinary travel tale yet done into Esperanto. One may question such a story as that of the Malemute Kid and the kangaroo, for one must be permitted to doubt the likelihood of that animal's surviving the bitter Arctic climate. The dogbreeder's perverse experiments are in keeping with the lawless life that characterised the un-

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

policed wastes of the pre-Soviet North.

The brain-shattering phenomena attendant on the break-up of glacial seas, the dazzling life of Nome and Dawson in the wild days of '98, the hazardous voyage up the Yukon River, the terrors of the Chilcoot Pass and the Whitehorse Rapids, the fever of spirit that lavished fortunes for goods and services in that mad time, are all described with the blank sincerity of one who has thrilled through the reality.

The translation, mirroring faithfully the mannerisms of the simple-souled raconteur, is excellent. The user of the international language has here, indeed, a literary advantage over him that only English knows. The Esperanto edition will doubtless serve in translating this modern Odyssey into the idioms of several of the smaller peoples, among many of whom may well be very few competent to deal with the Czech original.

The book is dedicated to Mr. John Merchant, president of the International Central Committee of the Esperanto Movement. It has 320 pages and costs 5/- unbound, 6/- bound. Published by the Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc, Czechoslovakia.

KION VI SCIAS.

Respondoj.

1. Amundsen.
2. La markolo de Behring; tridek-ses mejloj.
3. Quebec, Kanado.
4. La Statuo de Libereco.
5. Norde de Porto Riko; 31,336 futoj. (El "Amerika Esperantisto.")

"RIMPORTRETOJ."

Galerio de Esperantaj Steloj

Pentris: K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mondo,
Budapest.

Prezo 3ŝ. ĉe B.E.A. Paĝoj 128.

Per lerta mano ĉi tiu riĉrimeda ver-sisto ĉizas la karakteraĵojn de bonekonataj verdanoj, trafe, interese. Kontraŭ la fotoj de 55 pli-malpli eminentaj batalantoj por nia ideo staras koncerna buketo da belsonaj linioj. Iom mire, ke mankas tiaj nomoj, kiaj Collinson, Warden, Butler, Sidlovskaja. 50/51 (legu: Grosjean).

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, f-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Workso-p-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Belfncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.